

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft

Akademia Libroservo/IfK
Kleinenberger Weg 16B
D-33100 Paderborn

Die Humankybernetik (Anthropokybernetik) umfaßt alle jene Wissenschaftszweige, welche nach dem Vorbild der neuzeitlichen Naturwissenschaftversuchen, Gegenstände, die bisher ausschließlich mit geisteswissenschaftlichen Methoden bearbeitet wurden, auf Modelle abzubilden und mathematisch zu analysieren. Zu den Zweigen der Humankybernetik gehören vor allem die Informationspsychologie (einschließlich der Kognitionsforschung, der Theorie über „künstliche Intelligenz" und der modellierenden Psychopathometrie und Geriatrie), die Informationsästhetik und die kybernetische Pädagogik, aber auch die Sprachkybernetik (einschließlich der Textstatistik, der mathematischen Linguistik und der konstruktiven Interlinguistik) sowie die Wirtschafts-, Sozial- und Rechtskybernetik. - Neben diesem ihrem hauptsächtlichen Themenbereich pflegen die GrKG/Humankybernetik durch gelegentliche Übersichtsbeiträge und interdisziplinär interessierende Originalarbeiten auch die drei anderen Bereiche der kybernetischen Wissenschaft: die Biokybernetik, die Ingenieurkybernetik und die Allgemeine Kybernetik (Strukturtheorie informationeller Gegenstände). Nicht zuletzt wird auch metakybernetischen Themen Raum gegeben: nicht nur der Philosophie und Geschichte der Kybernetik, sondern auch der auf kybernetische Inhalte bezogenen Pädagogik und Literaturwissenschaft. -

La prihoma kibernetiko (antropokibernetiko) inkluzivas ĉiujn tiajn sciencobranĉojn, kiuj imitante la novepokan natursciencon, klopodas bildigi per modeloj kaj analizi matematike objektojn ĝis nun pritraktitajn ekskluzive per kulturscienca metodoj. Apartenas al la branĉaro de la antropokibernetiko ĉefe la kibernetika psikologio (inkluzive la ekkon-esploron, la teoriojn pri „artefarita intelekto" kaj la modeligajn psikopatometrion kaj geriatrion), la kibernetika estetiko kaj la kibernetika pedagogio, sed ankaŭ la lingvokibernetiko (inkluzive la tekststatistikon, la matematikan lingvistikon kaj la konstruan interlingvistikon) same kiel la kibernetika ekonomio, la socikibernetiko kaj la jurkibernetiko. - Krom tiu ĉi sia ĉefa temaro per superrigardaj artikoloj kaj interfake interesigaj originalaj laboraĵoj GrKG/HUMANKYBERNETIK flegas okaze ankaŭ la tri aliajn kampojn de la kibernetika scienco: la biokibernetikon, la inĝenierkibernetikon kaj la ĝeneralan kibernetikon (strukturteorion de informecaj objektoj). Ne lastavice trovas lokon ankaŭ metakibernetikaj temoj: ne nur la filozofio kaj historio de la kibernetiko, sed ankaŭ la pedagogio kaj literaturscienco de kibernetikaj sciaĵoj. -

Cybernetics of Social Systems comprises all those branches of science which apply mathematical models and methods of analysis to matters which had previously been the exclusive domain of the humanities. Above all this includes *information psychology* (including theories of cognition and 'artificial intelligence' as well as psychopathometrics and geriatrics), *aesthetics of information* and *cybernetic educational theory*, *cybernetic linguistics* (including text-statistics, mathematical linguistics and constructive interlinguistics) as well as *economic*, *social* and *juridical cybernetics*. - In addition to its principal areas of interest, the GrKG/HUMANKYBERNETIK offers a forum for the publication of articles of a general nature in three other fields: *biocybernetics*, *cybernetic engineering* and *general cybernetics* (theory of informational structure). There is also room for *metacybernetic* subjects: not just the history and philosophy of cybernetics but also cybernetic approaches to education and literature are welcome.

La cybernétique sociale contient tous le branches scientifiques, qui cherchent à imiter les sciences naturelles modernes en projetant sur des modèles et en analysant de manière mathématique des objets, qui étaient traités auparavant exclusivement par des méthodes des sciences culturelles („idéographiques"). Parmi les branches de la cybernétique sociale il y a en premier lieu la psychologie informationelle (inclues la recherche de la cognition, les théories de l'intélligence artificielle et la psychopathométrie et gériatrie modeliste), l'esthétique informationelle et la pédagogie cybernétique, mais aussi la cybernétique linguistique (inclues la statistique de textes, la linguistique mathématique et l'interlinguistique constructive) ainsi que la cybernétique en économie, sociologie et jurisprudence. En plus de ces principaux centres d'intérêt la revue GrKG/HUMANKYBERNETIK s'occupe - par quelques articles de synthèse et des travaux originaux d'intérêt interdisciplinaire - également des trois autres champs de la science cybernétique: la biocybernétique, la cybernétique de l'ingenieur et la cybernétique générale (théorie des structures des objets informationels). Une place est également accordée aux sujets métacybernétiques mineurs: la philosophie et l'histoire de la cybernétique mais aussi la pédagogie dans la mesure où elle concernent la cybernétique.

ISSN 0723-4899

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft




Internationale Zeitschrift für Modellierung und Mathematisierung in den Humanwissenschaften
Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj
International Review for Modelling and Application of Mathematics in Humanities
Revue internationale pour l'application des modèles et de la mathématique en sciences humaines

HUMANKYBERNETIK

Inhalt * Enhavo * Contents * Sommaire

Band 37 * Heft 3 * Sept. 1996



Akademia Libroservo

Die GRUNDLAGENSTUDIEN AUS KYBERNETIK UND GEISTESWISSENSCHAFT

(grkg/Humankybernetik) wurden 1960 durch Max BENSE, Gerhard EICHHORN und Helmar FRANK begründet. Sie sind z.Zt. offizielles Organ folgender wissenschaftlicher Einrichtungen:

INSTITUT FÜR KYBERNETIK BERLIN e.V.
Gesellschaft für Kommunikationskybernetik
(Direktor: Prof.Dr.phil.habil. Heinz Lohse, Leipzig, D)

TAKIS - Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko
(prezidanto: D-ro Dan Maxwell, Washington, USA; ĝenerala sekretario: Inĝ. Milan Zvara, Poprad, SK)

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ San Marino
publikigadas siajn oficialajn sciigojn komplete en grkg/Humankybernetik

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft

Internationale Zeitschrift für Modellierung und Mathematisierung in den Humanwissenschaften
Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj
International Review for Modelling and Application of Mathematics in Humanities
Revue internationale pour l'application des modèles et de la mathématique en sciences humaines



Inhalt * Enhavo * Contents * Sommaire

Band 37 * Heft 3 * Sept. 1996



Akademia Libroservo

Verlag und Anzeigenverwaltung **Eldonejo kaj anonc-administrejo** **Publisher and advertisement administrator** **Edition et administration des annonces**



Akademia Libroservo - Internacia Eldongrupo Scienca:
AIEP - San Marino, Esprima - Bratislava, Kava-Pech - Dobrichovice/Praha,
IfK GmbH - Berlin & Paderborn, Libro - Jelenia Góra
Gesamtherstellung: **IfK GmbH**
Verlagsabteilung: Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn,
Telefon (0049-/0-)5251-64200 Telefax: -163533

Die Zeitschrift erscheint vierteljährlich (März, Juni, September, Dezember). Redaktionsschluß: 1. des vorigen Monats. - Die Bezugsdauer verlängert sich jeweils um ein Jahr, wenn bis zum 1. Dezember keine Abbestellung vorliegt. - Die Zusendung von Manuskripten (gemäß den Richtlinien auf der dritten Umschlagseite) wird an die Schriftleitung erbeten, Bestellungen und Anzeigenaufträge an den Verlag. - Z. Zt. gültige Anzeigenpreisliste auf Anforderung.

La revuo aperadas kvaronjare (marte, junie, septembre, decembre). Redakcia limdato: la 1-a de la antaŭa monato. - La abondaŭro plilongiĝas je unu jaro se ne alvenas malmendo ĝis la unua de decembro. - Bv. sendi manuskriptojn (laŭ la direktivoj sur la tria kovrilpaĝo) al la redakcio, mendojn kaj anoncojn al la eldonejo. - Momente valida anoncprezlisto estas laŭpete sendota.

This journal appears quarterly (every March, Juni, September and December). Editoial deadline is the 1st of the previous month. - The subscription is extended automatically for another year unless cancelled by the 1st of December. - Please send your manuscripts (fulfilling the conditions set our on the third cover page) to the editorial board, subscription orders and advertisements to the publisher. - Current prices for advertisements at request.

La revue est trimestrielle (parution en mars, juin, septembre et décembre). Date limite de la rédaction: le 1er du mois précédent. L'abonnement se prolonge chaque fois d'un an quand une lettre d'annulation n'est pas arrivée le 1er décembre au plus tard. - Veuillez envoyer, s.v.p., vos manuscrits (suivant les indications de l'avant-dernière page) à l'adresse de la rédaction, les abonnements et les demandes d'annonces à celle de l'édition. - Le tarif des annonces en vigueur est envoyé à la demande.

Bezugspreis: Einzelheft 20,-- DM; Jahresabonnement: 80,-- DM plus Versandkosten.

Druck: Druckerei Reike GmbH, D-33106 Paderborn

Bildungsinformatik an der Universität in Landau

von Hermann STEVER, Landau (D)

aus dem Institut für Bildungsinformatik Universität Koblenz-Landau Abteilung Landau

gewidmet Herrn Prof. Dr. Miloš Lánský zum 70. Geburtstag

⇒ Es wächst die Informationstechnik als gesellschaftliche Infrastruktur in ihrer Funktionalität. Die Abstraktion von Modellen der Umwelt nimmt zu. Es steigt die Komplexität der Systeme und der sie beschreibenden Formalismen. - Aber der Kopf des Menschen ist seit Jahrtausenden nahezu unverändert.

⇒ Angesichts der Entwicklung der Informationstechnik gilt es eine Brücke zu schlagen zwischen den Möglichkeiten der Informationsverarbeitung durch Menschen und den Möglichkeiten der Datenverarbeitung durch Maschinen.

⇒ Dies ist Ansatzpunkt und grundlegende Idee der Lehr- und Forschungsaktivitäten am Institut für Bildungsinformatik an der Abteilung Landau.

Bildungsinformatik hat den Teilbereich der Bildung zu erforschen, der mit den drei Stufen Lernen-Lehren-Verwalten als (rekursives) System aufgebaut werden kann. Als Forschungsfelder mit ausgewiesenen Ergebnissen ergeben sich damit bisher Repräsentation des Wissens, Lernmodelle, Planungsalgorithmen sowie subjektive Reduktion der Komplexität von Information.

Wissenschaftshistorisch basiert die Bildungsinformatik auf der weltweiten Kybernetik-"Bewegung" der Nachkriegszeit. Ende der sechziger Jahre wurde die Bildungsinformatik an der Universität Linz (A) erstmals als Studiengang eingerichtet. Parallel zu der Entwicklung einer kybernetischen Pädagogik in Deutschland entwickelte sie sich dort im Rahmen einzelner bildungskybernetischer Projekte zu einem selbständigen Forschungsparadigma. Dieses basierte im wesentlichen auf den theoretischen Grundlagen der "mathematischen Pädagogik", die Miloš Lánský in den sechziger Jahren bei der Suche nach geeigneten mathematischen Strukturen zur genaueren Formulierung von Grundbegriffen der Pädagogik in Karlsbad und Prag formulierte.

Eine Intensivierung der Forschungs- und Entwicklungsarbeiten wurde in den Jahren 1971-91 durch das Institut für Bildungsinformatik (zunächst FEoLL GmbH , später Universität Paderborn) realisiert. Aus dieser Phase stammen zahlreiche Publikationen zur Informatik als Lehrgegenstand, zur Unterstützung von Lehr - und Lernprozessen durch

die Entwicklung formaler Lehr- und Lernmodelle, zur quantitativen Analyse von Prozessen der subjektiven Informationsverarbeitung, zur Verwaltung von Bildungsinstitutionen sowie zur Humanisierung des Mensch-Maschine-Dialogs. Eine Fortsetzung dieser Aktivitäten findet derzeit im Rahmen des Faches Bildungstechnologie an den Universitäten Prag (CZ), Budweis (CZ) und Nitra (SK) statt.

In der Bundesrepublik Deutschland wurde 1993 nach mehrjährigen konzeptionellen Vorarbeiten an der Universität in Landau das Institut für Bildungsinformatik gegründet. Es sieht seine Hauptaufgabe in der Entwicklung von Informatikmethoden für das Bildungswesen und für die Unterstützung von Bildungsprozessen.

Die Situation in den an der Landauer Universität stark vertretenen Studiengängen zur Vorbereitung auf den Lehrberuf ist dadurch gekennzeichnet, daß das Erkennen von Strukturen, die der rechnergestützten Simulation bzw. Modellbildung zugänglich sind, von den vorherrschenden Denkgewohnheiten weit entfernt sind. Hier setzt das Institut für Bildungsinformatik an, indem es die Möglichkeiten zur Umsetzung von Sachverhalten des Lehrens und Lernens in vorhandene, rechnergestützte Modelle der Informatik in seinem **Lehrangebot** thematisiert.

Aktueller **Forschungsschwerpunkt** ist das Zusammenwirken von wissensbasierten Systemen und menschlichen Experten zur Entwicklung computergestützer Problemlösungsverfahren in ausgewählten Einzelwissenschaften. Ziel ist die optimale Gestaltung der Schnittstelle zwischen auf regelbasiertem Wissen gegründeter technischer Intelligenz und der menschlichen Intelligenz mit ihren assoziativen Fähigkeiten, die insbesondere durch spontane Intuition und Überschreitung des bewußten Wahrnehmungsraumes gekennzeichnet ist. Dabei wird nicht außer acht gelassen, daß eine unstrukturierte Weltsicht zumindest als Randbedingung Entscheidungsprozesse beeinflußt und deshalb in deren Analyse aufgenommen werden muß.

Der **Landauer Forschungsansatz** unterscheidet sich deutlich von dem frühen Ansatz der kybernetischen oder mathematischen Pädagogik: Dieser ging davon aus, daß es möglich und ausreichend ist, die formalwissenschaftliche Methode der Informatik auf Bereiche der Bildungswissenschaften zu übertragen. Die Nichtakzeptanz der Entwicklungsergebnisse, etwa im Bereich CUU und Programmierte Instruktion, sowie die Ausgliederung und Verselbständigung einzelner Teilbereiche - wie z. B. Software-Ergonomie oder Didaktik der Informatik - läßt es geboten erscheinen, eine Modifikation des Forschungsparadigmas vorzunehmen, um den persönlichkeitsbezogenen Charakter in seiner zentralen Rolle des Bildungsgeschehens herauszustellen.

Methodisch ist unser Konzept von der Erkenntnis geleitet, daß die Weiterentwicklung von Informatikmethoden nicht nur auf das Methoden- und Modellpotential der Informatik zurückgreifen kann, sondern auch auf das der Bildungswissenschaften. Der Forschungsgegenstand selber liefert somit wichtige Impulse für die Weiterentwicklung der Methodik, ist also nicht nur Gegenstand, sondern auch Mittel.

Forschungsaktivitäten

Die Abbildung stellt die Forschungsaktivitäten im Bereich der Bildungsinformatik an der Abteilung Landau in den letzten Jahren dar. Sie versucht, neben der zeitlichen Abfolge der einzelnen Forschungsvorhaben auch ihre inhaltlichen Bezüge aufzuzeigen.

Forschungsaktivitäten der Bildungsinformatik an der Universität Koblenz-Landau Abteilung Landau

Herstellerneutrale Vorausqualifizierung für Schulungsmaßnahmen zur Datenverarbeitung und Informationstechnik

Ein Modell zur Bewertung des Schwierigkeitsgrads von Aufgaben

▽▽ ▽▽

Informationstheoretische Analyse der Aneignung von Wissen und dem Erlernen von Fertigkeiten speziell im Bereich der Informations- und Kommunikationstechnologien

▽▽ ▽▽

Entwicklung von Beurteilungs-, Bewertungs- und Leistungskriterien für Lehr-/Lernprozesse im Studium der Informationstechnik/Informatik

Entwicklung eines Konzeptes zur Vermittlung von Fähigkeiten und Fertigkeiten beim Einsatz neuer Informations- und Kommunikationstechnologien in der Umwelterziehung

▽▽ ▽▽ ▽▽ ▽▽

Analyse, Gestaltung und Evaluation von PC-Anwender-trainingskursen

Inhaltsadäquate Methoden zur interkulturellen Effizienzmessung universitärer PC-Kurse

Analyse von Wachstumsmodellen in verschiedenen Software-umgebungen

Integriertes Bestimmungssystem für Tier- und Pflanzen-familien

Lehraktivitäten

Zeitgleich mit der Errichtung des Instituts wurde an der Universität Koblenz-Landau, Abteilung Landau, die Möglichkeit zur Ablegung der **Ergänzungsprüfung** "Informationstechnik als weiteres Fach" geschaffen. Als Voraussetzung für die Zulassung zum Studium gilt die erfolgreiche Ablegung der Staatsprüfung für das Lehramt an Grund- und Hauptschulen oder die Einschreibung mit diesem Studienziel an der Universität Koblenz-Landau. Das Studium umfaßt unter Berücksichtigung der aktuellen Entwicklung der Informationstechnik die folgenden Bereiche

- A Systeme, Arbeitsweisen und allgemeine Anwendungen 8 SWS
- B Schulfachspezifische Einsatzgebiete 4 SWS
- C Erziehungswissenschaftliche Bezüge 6 SWS

Als Zulassungsvoraussetzungen zur Erweiterungsprüfung ist aus diesen drei Bereichen jeweils ein Leistungsnachweis zu erbringen. Der Leistungsnachweis aus dem Bereich B muss in engem Bezug zu dem im Rahmen eines Studiums für das Lehramt an Grund- und Hauptschulen gewählten 1. und/oder 2. Fach stehen, und es kann ein Leistungsnachweis anerkannt werden, der als Leistungsnachweis für das Studium des 1. und/oder des 2. Fachs im Rahmen eines Studiums für das Lehramt an Grund- und Hauptschulen Verwendung gefunden hat, wenn ein hinreichender informationstechnischer Inhalt nach-

gewiesen wird. Unter der gleichen Voraussetzung kann für den Bereich C ein Leistungsnachweis anerkannt werden, der im Hauptstudium Verwendung gefunden hat.

Die konkrete Ausgestaltung des Lehrangebotes ist durch das Vorlesungsverzeichnis dokumentiert und soll hier nur durch eine Auswahl aus bisher entstandenen Studien- und Prüfungsarbeiten exemplifiziert werden:

Problemlösen und Programmieren - Ein Modell unter spezieller Berücksichtigung eines Lehrgangs für die Sekundarstufe I

LOGO in der Grundschule. Ein Schulversuch

Computer-Algebra-Programme im Mathematikunterricht des zehnten Schuljahres - Vergleich von MAPLE mit DERIVE

Versuch einer Elementarisierung zur Einführung genetischer Algorithmen
Eine formale Grammatik zur Beschreibung von Verzweigungssystemen

Schlußbemerkung

Fragestellungen, Inhalte und Methoden der Bildungsinformatik werden auch weiterhin einem Wandel unterzogen sein, ohne allerdings auf aktuelle Modeerscheinungen in den beteiligten Wissenschaftsdisziplinen hektisch zu reagieren. Die Weiterentwicklung ist gewährleistet, wenn Kollegen unterschiedlicher Fachbereiche zu Partnern eines interdisziplinären Forschungsansatzes werden. Die Institutionalisierung dieser Idee in Landau führte schon bald zu einer verstärkten Internationalisierung in Verbindung mit schöpferischen Synergieeffekten bei der Ausnutzung der Querschnittsdimension der Bildungsinformatik.

Schrifttum

Lánská (Hrsg.) J. : Bildungsinformatik - Miloš Lánskýs ausgewählte Werke, Akademia Libroservo, Prag 1993
Stever, H.: Beispiele für Fragestellungen und Methoden der Bildungsinformatik, in: Arbeiten und Lernen - Wirtschaft 1996 (im Druck)

Eingegangen am 27.06.1996

Anschrift des Verfassers: Univ.-Prof. Dr. rer. nat. Hermann Stever, Institut für Bildungsinformatik/Universität, Im Fort 7, D-76829 Landau/Pf.

Educational informatics on the Landau University (Summary)
Achievments, results, knowledge and techniques of informatics persuade increasingly all other sciences, and of course especially traditional educational sciences. In 1993 the Institute of Educational Informatics was founded within the department of natural sciences at the University in Landau. The institute takes traverse dimension of informatics into account and makes its main objektive the application of methods of informactics to educational sciences. All subjects of research are analysed in team work with multiple sciences. Doing so the institute meets the demands of integration not only the methods and models of informatics but also those of educational sciences when applying and inforcing methods of informatics.

grkg / Humankybernetik
Band 37 · Heft 3 (1996)
Akademia Libroservo / IfK

Planlingvo kiel 12-a traktatlingvo

de Werner BORMANN, Hamburg (D)

Instrukomisiito pri interlingvistiko, Universitato Hamburg

Planlingvoj havas apartajn problemojn ĉe la tradukado de fakaj tekstoj. Tio estas montrebla per ekzemploj el la fako trafiko. La eblo, ke oni veturas en grandurboj en ĉiuj publikaj trafikiloj, havante nur unu solan bileton, baziĝas sur interkonsento inter la kompanioj, nomita germane Verkehrsverbund.

Tio ĉi estas termino kiu rifuzas simplan tradukadon. Se oni volas scii ĝian ekvivalenton en la sveda lingvo, necesas esplori, kiel nomiĝas tia institucio en Stockholm, Göteborg aŭ Malmö. La tie uzata vorto estas la ĝusta tradukaĵo.

En la kazo de planlingvoj mankas tiu ĉi komunumo aplikanta tiun lingvon. Ne ekzistas "Esperantujo" aŭ "Interlingua-lando" kun urboj, en kiuj estas establitaj iuj interkonsentoj pri unueca bileto. Do la uzantoj de planlingvo devas elpensi taŭgan vorton.

Kiel oni procedas en tiaj demandoj, tion eblas montri nur en Esperanto, ĉar sole tiu planlingvo estas aplikata en la praktiko. Por la termino Verkehrsverbund la fervojista kongreso en 1995 uzis la esprimon "trafika federacio" (Halasz 1995, paĝo 15). Mi skribis en lernolibro pri la trafiko en 1992 "trafikkomunaĵo" (Bormann 1992, paĝo 25). Faka vortaro de 1993, la Esperanto-parto de la Lexique générale des termes ferroviaires, aplikas la adjektivon "kombinita": kombinita tarifo, kombinita transportdokumento (Hartig 1993, paĝo 164).

Do en Esperanto pluraj vortoj estas en uzo unu apud la alia por la sama fakto. Tio ne egalas al la normo de faka komunikado en naciaj lingvoj.

En planlingvo necesas decido, kiu vorto estu la ĝusta por tio, kio en la germana nomiĝas Verkehrsverbund. Post kiam la nomigo ne okazas pere de la institucio mem, ties lokon devas preni deklaro, kiu montras la validan terminon por ĉiuj parolantoj de la planlingvo.

Tradukado de traktatoj kaj kontraktoj

En la kazo de traktatoj kaj kontraktoj estas aparte necese precize esprimi tion, kion la partneroj celas. Gravas ĉiu vorto, ĉiu nuanco. De la unuopaj formuladoj en traktatoj kaj kontraktoj dependas devigoj pri farotaj laboroj kaj pagoj. Fine, traktatoj kaj kontraktoj devas subiĝi al tribunalaj postekzamenoj. Pro tiuj altaj postuloj traktato estu la ekzemplo, laŭ kiu la nun sekvantaj rezonadoj okazos.

Ĉiu ajn traktato aŭ kontrakto povus esti la modelo. Kontrakto pri rebonigo aŭ pretigo de grandkonstruaĵo kun internacia financado estus aparte interesa, ĉar ĉe tiaj temas pri tre altaj monsumoj, kio forte elstarigas la problemecon.

Ĉi tie la ekzemploj troviĝas en la Traktato pri la Eŭropa Unio, ĝenerale citita kiel la Traktato de Maastricht (Läufer 1995).

Nuntempe ĝin tradukas en Esperanton grupo de juristoj, aliaj ekspertoj kaj tradukistoj. Sed eĉ pli grave por la rezonado ĉi tie estas, ke tiu ĉi teksto ekzistas en 11 lingvoj, tiuj estas la oficialaj kaj laborlingvoj de la komunumo. Tial eblas fari lingvajn komparojn.

Interlingvistiko

La problemo de la tradukado en iun planlingvon devus esti traktita de ekspertoj de ĝuste tiu ĉi planlingvo. Sed ekzistas ankaŭ principaj problemoj, kiuj sentiĝas en ĉiuj modeloj de planlingvoj. En tiu kazo temas pri demandoj, kiujn esploras la interlingvistiko.

La interlingvistiko diferencigas inter diversaj kategorioj de planlingvoj. Traktitaj estas ĉi tie, por fari klara la problemon de fakaj tekstoj, iliaj du plej gravaj specoj.

"Unu estas skemismo: ke vortfarado kaj derivado en la planlingvo estu plene regula, komplete sistema, tiel ke ĝi kapablas krei siajn proprajn vortformojn laŭ aŭtonomia interna dinamiko. La alia estas naturalismo: ke la planlingvo devas severe sekvi la t.n. 'naturajn' lingvojn, precipe la latinan kaj latinidajn ..." (Wells 1978, paĝo 57).

Skemisma aŭ aŭtonoma estas Esperanto, naturalisma estas Interlingua. Tamen, ankaŭ Esperanto estas proksima al la eŭropaj lingvoj: "lingvoorientiga instruado" estas tial "propedeŭtiko pri fremdlingvoj" por la eŭropaj lingvoj instruataj en la lernejoj (Frank 1993, paĝo 106).

La esploraĵo ĉi tie prezentas komparon pri la kapabloj de diversaj planlingvoj venki super la malfacilaĵoj de fakaj tradukadoj. Por montri en komprenebla formo, kiuj estas la problemhavaj detaloj, sufiĉas la selektado de kelkaj terminoj kaj ilia prilaborado. La interlingvistikaj demandoj estos nun traktitaj kun tri problemoj de fakvortoj.

Ĉapitro trafiko

La Traktato de Maastricht entenas la per siaj preskriboj ŝanĝitan Traktaton pri la Eŭropa Komunumo, al kiu apartenas la ĉapitro IV, trafiko (Läufer 1995, paĝo 162 kaj sekv.) Kie la germana lingvo uzas la vorton Verkehr, aliaj komunumaj lingvoj aplikas siajn vortojn por transporto. Tion oni povas montri kun la ekzemplo de la termino trafiksekureco (Vocabularium 1994, paĝo 13):

FR sécurité des transports	ES seguridad de los transportes
EN transport safety	PT segurança dos transportes
DE Verkehrssicherheit	(EL asfaleia ton metaforon)
IT sicurezza dei trasporti	FI liikenneturvallisuus
NL veiligheid van hed vervoer	SV transportsäkerheten
DA transportsikkerhed	

Ambaŭ vortoj: trafiko kaj transporto, povas doni la bazon por la tradukado en Esperanton. La multaj nacilingvaj ekzemploj altrudas la vorton transporto. Tiel ankaŭ faris la jam ekzistantaj provtradukoj.

Evidente la modeloj de gepatraj lingvoj influas la elekton de la vorto. Sed aŭtonoma planlingvo devas sekvi sian propran linion. Ĝi bezonas siajn difinojn. Tial necesas unue la esplorado, kio estas la diferenco inter la du vortoj trafiko kaj transporto.

Por tio oni bezonas vortaron, kiu ne tradukas la vortojn de la planlingvo per iliaj nacilingvaj ekvivalentoj, sed priskribas ilin en la planlingvo mem kaj donas ekzemplojn el la literaturo de la planlingvo. Tia difinanta vortaro por Esperanto estas la Plena Ilustrita Vortaro (Waringhien 1970).

Trafiko estas difinita kiel "1) transportado de personoj, varoj aŭ informoj, surakve, surtere aŭ enaere, 2) nombro da personoj, kvantoj da varoj aŭ informoj transportataj; intenseco kaj ofteco de cirkulado de transportrimedoj, 3) maniero en kiu aranĝiĝas la cirkulado" (Waringhien 1970, paĝo 1125).

Transporto ne estas registrita kiel memstara kapvorto. Ĝi troviĝas ĉe: porti. Tie staras por la substantivo transporto: "rezulta sumo de unu kolumno, paĝo aŭ konto, kiun oni reskribas memorige ĉe la supro de la sekvanta kolumno, ktp" (Waringhien 1970, paĝo 852). Temas do pri termino el la kampo de librotenado: transporto = interduma sumo por la sekvanta paĝo.

La verbo transporti signifas laŭ la sama fonto: "porti de unu loko en alian". De tio eblas derivi la substantivon transporto, kiu devas havi la saman signifon.

Ĉu por la traduko de la ĉapitronomo en Esperanton elektiĝu nun trafiko aŭ transporto, ne povas esti indiferente. El tio ja sekvus, ke ambaŭ vortoj estas tute samsignifaj.

Havi du vortojn sen reciproka diferencigo por la sama afero, tio povus esti salutinda en beletro. Sed en la faka lingvo sinonimoj ne estas raciaj. Aldone, en planlingvo la kvanto da memstaraj vortoj devas esti limigita por ke ĝi estu facile lernebla. Tial ili estas ĉiukaze raraj.

Do la Esperanto-vortoj trafiko kaj transporto devas havi diversajn signifojn kvankam tiuj estas parencaj. Por elekti la ĝustan vorton de la ĉapitronomo estas esplorinde, kion nun la ĉapitro trafiko traktas.

Trarigardo de la teksto montras, ke ĝi ne traktas nur la transportadon de io. Kontraŭe, la preskiboj regulas multe pli da aferoj ol nur portadojn, sed ankaŭ detalojn, kiuj apartenas al la trafiko ĝenerale sed ne estas transportadoj.

Surbaze de unue la ĉapitroenhavo kaj due la difinvortaro la titolo de la ĉapitro en Esperanto devus esti: trafiko.

La alia planlingvo en tiu ĉi esploraĵo estas la naturalisma Interlingua. La vortaro Interlingua/germana konstatas: Beförderung = transporto, kaj Verkehr = circulation, traffico; aldone traffico = Handel, Verkehr (Schild 1967).

Kontrolante la vortaron oni do ricevas la impreson, ke Interlingua havas la samajn malfacilaĵojn kiel Esperanto. Sed en Interlingua la tradukado ne estas tiel komplika.

Ĝia naturalisma vortaro finfine konstruiĝis sur "internacia vortostoko", kiu "estas trovebla en la romidaj lingvoj", tiuj estas "la angla, franca, itala, portugala kaj hispana"

(Gopsill 1990, paĝo 227). Ili estas la "kontrollingvoj" (Gopsill 1990, Paĝo 166) de Interlingua.

En la faka literaturo de interlingvistiko ili estas klare grupigitaj: "a) itala, b) hispana/portugala, c) franca kaj angla" (Blanke 1985, paĝo 179). Tiu ĉi sinsekvo baziĝas sur la proksimeco de ĉiu el tiuj etnolingvoj al la origina lingvo, la latina; ĝi do ne estas arbitra sed bone motivita.

En tiuj kontrollingvoj la jenaj vortoj estas aplikitaj (parte en pluralo) (Vocabularium 1994, paĝo 13):

a) IT trasporti
b) ES transportes PT transportes
c) FR transports EN transport

Per tio estas klare, kiel tekstas la sole ĝusta traduko: en Interlingua la titolo de la ĉapitro devas esti: transporto.

La kazo de tiuj du tradukaĵoj (en Esperanton kaj en Interlingua) montras la esencajn diferencojn inter la kategorioj de planlingvoj, skemismaj unuflanke kaj naturalismaj aliflanke.

Ekonomia kaj Valuta Unio

La ekonomia integriĝo de la ŝtatomembroj de la Eŭropa Unio moviĝas al densa interplektiteco en Eŭropa Ekonomia kaj Valuta Unio kun ĝia komuna mono, kiun oni pli frue nomis ekuo kaj kiu nun nomiĝu eŭro. Por tiu nova eŭropa unueco ekzistas en la Uniaj lingvoj la jenaj nomoj (Vocabularium 1994, paĝo 25):

FR Union économique et monétaire
EN Economic and monetary union
DE Wirtschafts- und Währungsunion
IT Unione economica e monetaria
NL Economische en Monetaire Unie
DA Den Økonomiske og Moneære Union
ES Unión Económica y Monetaria
PT União Económica e Monetária
(EL oikonomikis kai nomismatikis enosis)
FI rahaliiton ...
(raha = mono, liitto = unuiĝo)
SV den ekonomiska och monatära unionen

Dum la vortoj por ekonomio kaj unio ne prezentas dubojn (kaj ankaŭ ne la ĉi tie ne menciita adjektivo eŭropa), la alia termino montras diversecon: en la 11 variantoj aperas kaj la vorto valuto kaj la vorto mono.

Ambaŭ vortoj ekzistas ankaŭ en Esperanto. En mia libro "Por plurlingveco de Eŭropo", kiu aperis dulingve en la germana kaj en Esperanto, mi uzis en Esperanto la nomon "Eŭropa Ekonomia kaj Valuta Unio" (Bormann/Frank 1994, paĝo 11). Ankaŭ la

Esperantovortaro pri politikaj terminoj parolas pri "komuna valuto" (Maul 1994, paĝo 446). Unu el la ebloj de traduko estas la Esperantovorto: valuto.

Aliflanke la laborgrupo tradukanta la Traktaton de Maastricht proponis la nomon Ekonomia kaj Mona Unio. Al la uzo de tiu ĉi adjektivo premas la fakto, ke tiom da etnolingvoj aplikas ĝuste tiun ĉi terminon.

Ankaŭ ludas rolon, ĉu ĉiu el la uzataj komunumaj lingvoj entute kapablas esprimi diferencon inter mono kaj valuto (tio eblas en Esperanto kiel montrite).

La angla lingvo posedas ambaŭ substantivojn, money kaj currency. La angla vorto currency, valuto, eĉ estas uzata en la eŭropa unuiĝo, sed en alia kunteksto: la nomo de la mono ekuo (Ecu) estas la mallongigo de European Currency Unit (Weidenfels/ Wessels 1994, paĝo 360).

Nur la substantivo money, sed ne la substantivo currency, formas propran adjektivon: tion esprimi plenumas por ambaŭ la vorto monetary. Elektante en la angla por la valuta unio adjektivan nomon, oni ne povis alie ol apliki la vorton por mono (monetary).

Evidente do ankaŭ gravas, ĉu la nomo de la unio formiĝas per substantivoj (kiel en la germana) aŭ (kiel en ĉiuj aliaj lingvoj, ankaŭ la ĝermanaj) helpe de adjektivoj. Tiu ŝajne marĝena afero povas decidi pri la uzota nomo.

Nun necesas esplori, kion signifas la Esperanto-vortoj mono kaj valuto laŭ siaj signifoj.

Mono estas "pagilo, laŭleĝe fabrikata kaj konsistanta el stampita metaldisko aŭ surpresita paperfolio kun difinita valoro, por servi kiel interŝanĝilo en aĉeto kaj vendo" (Waringhien 1070, paĝo 706). Valuto estas "1) Mono aŭ monsistemo cirkulanta en unu lando ..." (Waringhien 1970, paĝo 1167). En Esperanto do estas klara diferenco inter mono kaj valuto.

Pri la valuta unio troviĝas ampleksa regulado en la Traktato de Maastricht; eĉ en la indekso staras la kapvortoj (en la germana kun la elemento Währungs-...) valuta komisiono, valuta unueco, valuta instituto, valuta politiko, valuta sistemo (Läufer 1995, paĝo 340). Tiu ĉi unio do ne rilatas al nur la pagilo, sed traktas en vasta kadro ĉiujn fenomenojn ligitajn al la monsistemoj.

Tiuj konsideroj devus ŝovi la varianton Ekonomia kaj Mona Unio en la malantaŭon kaj doni preferon al la nomo Ekonomia kaj Valuta Unio. Tio validas eĉ tiam, kiam oni akceptas la ideon, ke ja la mono estas la esenca videblaĵo de valuto. Tamen, la vorto mono povus iel anstataŭi la vorton valuto kiel pars pro toto. Tial la nomo Ekonomia kaj Mona Unio estas komprenebla.

Interlingua havas la vorton monetari kiel la adjektivon pri mono kaj la substantivon valuta (Schild 1967). Malgraŭ tio ne povas okazi diskuto pri la ĝusta tradukado, kiel ĝin havas Esperanto.

La kaŭzo por tio denove troviĝas en la principo de la kontrollingvoj. Tiuj lingvoj aplikas la jenajn vortojn:

a) IT monetaria
b) ES monetaria PT monetária
c) FR monetaire EN monetary

La bildo estiĝinta estas tuta unueca. La kontrollingvoj uzas preskaŭ la saman vorton, kiu ankaŭ troviĝas en la vortaro de Interlingua. Tial la sole ĝusta traduko estas Union Economic e Monetari. La kontrollingvoj faris deviga tiun ĉi tradukaĵon.

Ekonomia kaj Sociala Konsilio

Tiu ĉi konsilio estis establita por ebligi kunlaboradon "de la diversaj grupiĝoj de la ekonomia kaj sociala vivo" (listigitaj estas i.a. produktistoj, kamparanoj, laboristoj, metiistoj) (Läufer 1995, paĝo 340). En ĝi partoprenas en la eŭropa evoluo la partneroj de la labormerkato (entreprenistoj kaj sindikatoj).

La laborgrupo por la tradukado de la Traktato de Maastricht en Esperanton, menciita en la ĉapitro tradukado de traktatoj kaj kontraktoj, imagas al si por tio la nomon Ekonomia kaj Socia Konsilio.

Denove estas ekster diskuto la traduko de ekonomia. Sed socia estas la adjektivo de la substantivo socio, kaj tio estas la kunvivantaro.

La difino por socia estas en Esperanto "1) koncernanta la socion, 2) vivanta en socio, 3) sociala". Socio estas priskribita kiel la "tuto da homoj, kunvivantaj pro komunaj interesoj kaj havantaj komunajn kutimojn kaj komunajn leĝojn". La difino por sociala estas "koncernanta la komunajn ekonomiajn interesojn de la socio, kontraste kun la politikaj" (Waringhien 1970, paĝo 1007).

Ĉar ekzistas du ebloj de tradukado denove necesas esplori, kiajn taskojn nun havas la menciita konsilio. Laŭ ĝia ĉi tie prezentita konsisto, en tiu konsilio kunlaboras, kiel fiksita en la Traktato de Maastricht, ne sociaj decidantoj kiel eklezioj, reprezentantoj de la junularo, virinaj organizaĵoj, delegitoj de la maljunularo, sed sole rondoj ligitaj al la ekonomia vivo.

Plua indiko pri ĝia ekonomia orientiĝo venas kiel konsekvenco el la lokigo de tiu ĉi konsilio en la Traktato pri la Eŭropa Komunumo: tiu ĉi traktato temas nur pri la ekonomio. Tial oni devus elekti por ĝia nomo en Esperanto la ekonomirilatantan adjektivon, kaj ĝi devus nomiĝi Ekonomia kaj Sociala Konsilio.

Kion la konsilio prilaboras, tiuj estas demandoj el la sociala politiko. Dum tiu esprimo estas en la germana kaj en la skandinaviaj lingvoj unu kunmetita substantivo, la romidaj lingvoj kaj la angla uzas vortgrupojn kun adjektivo. Sociala politiko nomiĝas en la komunumaj lingvoj (Vocabularium 1994, paĝo 34):

FR politique social	ES política social
EN social policy	PT política social
DE Sozialpolitik	(EL koinoniki politiki)
IT politica sociale	FI sosiaalipolitiikka
NL sociale politiek	SV socialpolitik
DA social- og arbejdsmarkedspolitikken	

Kun la germana termino kiel bazo estas tute klare, ke estas celite al la prilaborado de socialaj aferoj. Tiam ankaŭ altrudiĝas la Esperanto-tradukaĵo sociala konsilio. Kiam alia lingvo estas la bazo de tradukado, duboj rapide enŝteliĝas.

La angla adjektivo social rilatas al la socio kiel tuto kaj al la socialaj cirkonstancoj. Tial la angla nomo social councel ne estas unusenca, sed ĝi signifas ambaŭ aferojn. En la angla tute ne estis eble preni por la Ekonomia kaj Sociala Konsilio simplan nomon kiel ĝi havas ĝin, kun senduba klareco, en la germana, sed ankaŭ en Esperanto.

Dum la aŭtonoma planlingvo Esperanto devas solvi komplikajn demandojn farante la tradukon de la nomo de tiu ĉi faka institucio, en Interlingua la situacio estas facila. La vortaro entenas la vorton social en la kadro de la substantivo socio kiel ties adjektivon (Schild 1967).

La kontrollingvoj de Interlingua prezentas la jenajn vortojn:

a)	IT politica sociale
b) ES poliítica social	PT política social
c) FR politique social	EN social politicy

Denove la unueco de tiu ĉi vortuzo estas konvinkiga kaj ĝi permesas al la naturalisma planlingvo sian simplan solvon.

Ekster dubo estas ankaŭ la formulado helpe de adjektivo, pro kio la nomo de tiu ĉi konsilio en Interlingua devas esti Consilio Economic e Social. Ĉu la laborkampo de tiu konsilio estas nur la sociala sfero aŭ ĉu la tuta socio, restas neklare, en Interlingua same kiel en la etnolingvoj, kiuj ne kapablas evidentigi tiun ĉi diferencon per simpla vorto.

Konsekvencoj

Videbliĝis ke naturalisma planlingvo, konkrete: Interlingua, povas traduki fakajn tekstojn kun malmultaj malfacilaĵoj. La kampo por memstaraj pripensadoj estas malvasta, ĉar la ligiteco al kontrollingvoj estas forta.

Aŭtonoma planlingvo, konkrete: Esperanto, devas trovi siajn proprajn vojojn sur la bazo de sia memstareco. Tio kunportas multajn pripensadojn, kiuj devas okazi ene de la sistemo de tiu ĉi lingvo. Ĉar tia planlingvo ne havas sian bazon en ekzistantaj etnolingvoj, kiuj pludonas siajn modelojn ĉiam denove, ĝi bezonas memstaran fundamenton.

Problemo estas plej klare konstatebla kiam ĝi troviĝas en ekstrema situacio. En la kazo de traktatoj kaj kontraktoj tio estas disputo pri difinado de interkonsentitaj detaloj, kiu finfine okazas en tribunaloj. Se estas duboj pri la preciza signifo de klaŭzoj, kiujn havas teksto en Interlingua, tiam laŭ la principoj de Interlingua ĝiaj kontrollingvoj devus esti pridemandataj por ekscii kion la interkonsentintoj intencis esprimi.

Ĉar estas kvin kontrollingvoj, diversaj interpretadoj povas resti. Tial estas konsilinde koncentri sin al unu el la kontrollingvoj. Tiu povus esti la plej disvastiĝinta el ili, la angla, aŭ la plej proksima al la latina, do la itala. Tiu ideoĉeno kondukas al la eblo, ke itala tribunalo estu la decidanta institucio pri kontrakto verkita en Interlingua.

Tiu konsekvenco estas maloportuna, se oni komparas kun ĝi la supernacian pozicion de planlingvo. Se faka teksto en planlingvo ne estas plene esprimkapabla por si mem, tiam la apliko de planlingvo perdis sian sencon.

Internacia lingvo devas meti sin apud la naciajn lingvojn kiel samrangan rimedon de esprimado.

Tiam ĝi devas havi sian memstaran bazon. La granda signifo de vortaro kun difinoj estis ĉi tie priskribita. Ĝi plenumas sian funkcion nur kiam ĝi estas deviga; por tiu tasko ĝi devas esti aparte agnoskita de siaj uzantoj.

Ĉar difinvortaro rilatas nur al sia pasinta evoluoŝtupo, dum la planlingvo mem pluevoluadas, necesas apud ĝi prilingva institucio. Ĝi devas akompani la lingvan evoluon kaj se utile enmiksi sin, ĝi traktu pri pluaj difinoj kaj decidu pri la interpretado en dubaj kazoj. Ĝi povus ankaŭ konsili al tribunaloj pri kiel oni komprenu konstatojn en la planlingvo.

Nur se ambaŭ kondiĉoj estas plenumitaj, la problemoj ĉe la tradukado de fakaj tekstoj estas plene solveblaj.

Literaturo:

Blanke, D.: Internationale Plansprachen, Eine Einführung, Berlin 1985, ISSN 0138-550X

Bormann, W.: Trafiko (La merkato de la trafikservoj), Studmaterialo por kurso de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), Hamburg 1992

Bormann, W., Frank, H.: Por plurlingveco de Eŭropo, Berlin kaj Paderborn 1994, ISBN 3-929853-02-7

Frank, H.: Das Paderborner Experiment zum Sprachorientierungsunterricht, en Regozini 1993, paĝo 105 bis 108

Gopsill, F.P.: International Languages a matter for interlingua, Sheffield 1990, ISBN 0-9511695-6-4

Halasz, J.: La evoluo de la hungara trafiko ĝis la 1100-jara datreveno de la patrujokupado, Budapest 1995, faka prelego dum la 47-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso 1995

Hartig, D. kaj la Terminara Komisiono de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio: Fervoja Terminaro Esperanto-Germana, suplemento al Lexique générale des termes ferroviaires, Bremen 1993

Läufer, T. (prilaboranto): Europäische Union Europäische Gemeinschaft, Die Vertragstexte von Maastricht mit den deutschen Begleitgesetzen, Bonn 1995, ISBN 3-89331-227-7

Maul, S. (eldonanto): Deklingva Manlibro pri Politiko, Antwerpen 1994, ISBN 90-71205-50-9

Regozini, G. (eldonanto): Materialsammlung zur Konferenz "Das Kommunikations- und Sprachenproblem in der Europäischen Gemeinschaft - Inwieweit könnte eine 'Plansprache' zu seiner Lösung beitragen?", Bruselo 1993

Schild, A.: Wörterbuch Interlingua - Deutsch, Dictionario Interlingua - Germano, Basel 1967

Vocabularium, Traité sur l'Union européenne (Maastricht) kaj tiu titolo ankaŭ en 11 aliaj eŭropaj lingvoj, Document de travail, Version provisoire, subdepartemento Terminologio en la Tradukservo de la Eŭropa Komisiono, Bruselo 1994

Waringhien, G. kaj kunlaborantoj: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Paris 1970

Weidenfeld, W., Wessels, W.: Europa von A bis Z, Taschenbuch der europäischen Integration, Bonn 1994, ISBN 3-7713-0470~

Wells, J.: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, Rotterdam 1978,ISBN 92 9017 G2; 2

Ricevita 1996-06-08

Adreso de la aŭtoro: Dr. Werner Bormann, Schärstr. 26, D-21031 Hamburg

Eine Plansprache als 12. Vertragssprache (resumo)

Bei Plansprachen sind besondere Schwierigkeiten zu überwinden, wenn fachliche Texte genau übersetzt werden sollen. Diese Probleme werden anhand von drei Beispielen aus dem Vertrag über die Europäische Union behandelt: die Kapitelüberschrift Verkehr, die Europäische Wirtschafts- und Währungsunion, der Wirtschafts- und Sozialrat. Eine naturalistische Plansprache, Interlingua, klammert sich an ihre Kontrollsprachen. Deshalb ist zwar das Übersetzen bei ihr nicht schwierig, sie ist dadurch aber nicht neutral. Eine autonome Plansprache, Esperanto, ist eigenständig und deshalb neutral. Sie benötigt allerdings ein Definitionswörterbuch sowie eine auf das Sprachgeschehen einwirkende Einrichtung.

grkg / Humankybernetik
Band 37 · Heft 3 (1996)
Akademia Libroservo / IfK

Aussagelogik und erziehungswissenschaftliche Probleme

von Jan ČIPERA, Prag (CZ)

aus der Naturwissenschaftlichen Fakultät/Didaktik der Chemie/ der Karlsuniversität Prag
und der Landwirtschaftlichen Fakultät/Chemie/ der Südböhmischen Universität Budweiss

Diese Publikation gehört zu einer Reihe von Veröffentlichungen, die zeigen wollen, wie die kybernetische Pädagogik bei der Lösung von gegenwärtigen pädagogischen Problemen anwendbar ist. Zu diesen Problembereichen gehört zum Beispiel die objektive Einschätzung der Richtigkeit bzw. Unrichtigkeit bestimmter Aussagen, die Auswahl und Strukturierung des Lehrstoffes, die empirische Überprüfung der Verhältnisse zwischen den einzelnen Elementen des Lehrstoffes im Bewußtsein der Schüler und die Entwicklung von systematisch-logischen Denkoperationen der Schüler. Die Tatsache, daß die dargestellte Problematik am Beispiel des Chemielehrstoffes realisiert wird, ist u.a. dem Beruf des Autors dieses Artikels, eines Mitarbeiters am Lehrstuhl für Chemiedidaktik an der Naturwissenschaftlichen Fakultät der Karlsuniversität Prag und der Südböhmischen Universität Budweis, zuzuschreiben.

Eine Anregung zur Ausarbeitung dieser Veröffentlichung gaben u.a. die folgenden Zitate aus der deutschen Literatur zur Didaktik. So schreibt Klemmer im Jahr 1976:

„Man muß zugeben, daß für Voraussagen über den Chemieunterricht noch keine theoretische Basis zur Verfügung steht."

und Pfeifer 1995:

„So wird gerade im Chemieunterricht der Mittelstufe die Fähigkeit der Schüler/-innen zu abstraktem und systematisch-logischem Denken in einem Maße vorausgesetzt, wie sie von der Entwicklung (Intelligenz) bei vielen noch nicht gegeben ist. Fehleinschätzungen dieser Art wirken sich auf das Verständnis chemischer Sachverhalte besonders negativ aus."

1. *Abgrenzen der Hypothese*

Die Entwicklung aller wissenschaftlichen Disziplinen bringt in der Gegenwart einen Zuwachs von Erkenntnissen mit sich, der in einer geometrischen Reihe steigt. Im Erziehungsbereich entsteht somit gesetzmäßig ein Widerspruch zwischen der Anzahl der Erkenntnisse im Fachgebiet und der Zahl der Lehrstunden, die dem gegebenen Lehrfach gewidmet werden können. Es ist deshalb schon seit einigen Jahrzehnten nicht mehr möglich, die neu gewonnenen Erkenntnisse nur mechanisch in den Unterricht einzufügen. So ist es ein „Traum" aller Pädagogen, ein deduktiv-didaktisches Lehrstoffsystem zu schaffen, welches ermöglicht, daß die Schüler die für sie neuen Erkenntnisse selbst entdecken.

Durch dieses System könnten die Schüler die für sie neuen Erkenntnisse auch außerhalb des Lehrstoffes entdecken. Die Aufgabe, solch ein System zu schaffen, war relativ kompliziert und am Anfang stand die Lösung der folgenden Hypothese:

b) Pri la Subtena Sektoro: Fiaskis la dum SUS 15 en 1995 okazinta elekto de estraro de la Subtena Sektoro. La senato aprobis unuanime la proponon de la prezidanto, ke (1) la ĝisnuna vicdirektoro ASci. Piotrowski estu komisiita gvidi la Subtenan Sektoron, ke (2) estu nuligita la okazinta elekto, kaj ke (3) la vicdirektoro kune kun la prezidanto zorgu pri nova elekto de estraro kaj ties konstituiĝo laŭeble jam dum la prov-SUS en Nitra.

2. El la ofico de la vicprezidanto

a) La prezidanto atentigis, ke dum la sekcikunsidoj nepre necesas decidoj en la unuopaj sekcioj pri elekto de novaj dekanoj, vicdekanoj, fakarestroj kaj vicfakarestroj, kaj pri rangoaltigoj, por ke tiuj informoj povu enesti en la nova paperforma ISD.

b) Pri malmembrigo el AIS: Ekzistas kelkaj AISanoj, kiuj ne pagis la kotizojn dum pli ol unu jaro kaj kies servobonhavo ne havas sufiĉan pluson. Inter ili estas ankaŭ ordaj profesoroj. Antaŭ malmembrigo ĉiuj ricevu verkitan de kolego Maitzen lastan averton kun informo, ke kaze de restantaj ŝuldoj ili ankaŭ ne plu estos menciitaj en la nova ISD. Kolego Frank transprenos la koncernajn afrankokostojn. Tiuj, kiuj ne respondos, estu tuj eksigotaj. Kelkaj estu persone alparolotaj de kolegoj Frank, Maitzen aŭ Tyblewski. En difinitaj kazoj la ĝisnunajn kotizojn transprenos kolegoj Frank kaj Minnaja pro la specialaj cirkonstancoj.

3. El la financofico

a) La senato aprobe konstatis, ke en 1995 AIS povis pagi al ADoc. Mag. J. Lewoc salajron laŭ la kontrakto inter ŝi kaj AIS-Deutschland.

b) Bilanco por 1995: La trezoristo OProf. Wickström prezentis la bilancon por la jaro 1995 venintan al li du tagojn antaŭe. La akcioj de la societo „Akademidomaro“ perdis siajn komencajn valorojn, AIS posedas de tiu flanko verŝajne nur 9000,– DEM de la komencaj 20000,– DEM. (Laŭpete de la prezidanto protokolita: tiun sumon, t.e. 9000 markojn, pagus la prezidanto por havigi de AIS al si la koncernajn akciojn, se AIS pretus vendi ilin.) La disponebla kapitalo estas preskaŭ nulo. Ĉar la revizoroj ankoraŭ ne povis kontroli la bilancon, tial ne eblas, ke la Ĝenerala Asembleo senŝarĝu la malnovan trezoriston ADoc. Maertens kaj la senaton. Oni nur povas prezenti la bilancon al la Ĝenerala Asembleo sen peto de senŝarĝo.

c) Buĝeto por 1996: La trezoristo OProf. Wickström prezentis buĝeto-proponon por la Scienca Sektoro de AIS. La senato unuanime akceptis, ke de la enpagoj de la dumvivaj membroj AIS konsumu ĉiujare 5 procentojn. Por senŝarĝi AIS-on, la trezoristo proponis: la SubS provu atingi ĉe IfK per lerta marĉandado, ke la Subtena Sektoro ne pagu fiksajn kostojn por la revuo GrkG/Humankybernetik, sed nur la kromajn preskostojn kaŭzitajn de la al la membroj de la SubS disdonitaj ekzempleroj.

De tri oficoj de la Scienca Sektoro venis proponoj pri eblaj elspezoj kaj enspezoj en 1996 por iliaj aktivecoj: de la prezidanta ofico, de la protokolofico kaj de la financofico. La trezoristo proponis, ke unuarange ricevu ADoc. Mag. J. Lewoc vojaĝkostojn, nome po 1500,– DEM, kaj ke la tutan gajnon pro propraj aktivadoj (ekzemple dumSUSaj enspezoj, vendado de libroj kaj simile) ricevu la protokolofico. La buĝeto-propono estis unuanime akceptita de la senato kun la aldono, ke ĉiujn aldonajn enspezojn de la protokolofico oni unue uzu por pagi la vojaĝkostojn de ADoc. Mag. J. Lewoc.

La prezidanto atentigis, ke celligitaj donacoj ne estas je la libera dispono de AIS kaj ke oni nepre devas atenti la postulojn de la donacintoj. Antaŭ SUS 17 la oficoj povas disponi pri duono de la aljuĝitaj buĝetoj, ĉar ne antaŭvideblas, kiel evoluos la mona situacio.

La trezoristo prezentis decidcele la sekvontajn naŭ punktojn, kiujn la senato en la jena formo akceptis:

1. Por ĉiu senatofico estu starigita servobonhavo. Se estas bezonate, tiam ĉiu funkcio havu sian propran servobonhavon.

2. Por ĉiu ofico 50% de la sumo aprobita de la Senato en la ĝenerala buĝeto estu je la dispono de la ofico ekde la komenco de la buĝeta jaro. La resto estu disponigita kondiĉe de la plenumo de la buĝetitaj enspezoj.

3. De la de la ofico mem proprainiciate akiritaj kaj enspezigitaj rimedoj la ofico tuj disponu 80%. La restantaj 20% eniru la ĝeneralan buĝeton.

4. De la enskribiĝkostoj de SUSoj 40% iru al la lokala partnera universitato aŭ asocio aŭ, se tia ne ekzistas, al la ĝenerala buĝeto de AIS, 40% al la protokolofico kaj 20% al la ĝenerala buĝeto de AIS.

5. La ekzamenkotizoj iru al la ĝenerala buĝeto de AIS.

6. De la restaj SUS-enspezoj 80% iru al la protokolofico kaj 20% al la ĝenerala buĝeto de AIS.

7. Se la ĝenerala buĝeto de AIS tion permesas, la prioritatoj por kromaj elspezoj dum 1996, krom la jam buĝetitaj kaj de la Senato aprobitaj, estas: unue, pagi la vojaĝkostojn de la senata sekretario, due, elspezi ĝis la alteco de DEM 2500 monate al la senata sekretario.

8. Celligitaj donacoj ne estas tuŝitaj de la unuaj sep punktoj de ĉi tiu propono.

9. En la kazo de nepra neantaŭvidita bezono la prezidanto rajtas kune kun la trezoristo deflankiĝi de punkto 7, anticipe de posta aprobo de la senato.

d) Grave ŝajnis al la Senato, ke AIS aliĝu al la listo de IAU (Internacia Asocio de Universitatoj), kio kostus unufoje proksimume 4950 FF. Oni provu serĉi la koncernajn monajn rimedojn, ekzemple inter la membroj de la Subtena Sektoro. Tiun proponon la senato akceptis unuanime kun unu sindeteno.

4. El la protokolofico

a) La protokolo de la 29a senatkunsido estis akceptita.

b) Elektitaj dekanoj por la deĵorperiodo 1996–1999 laŭ la surloka komuniko de la unuopaj sekcioj:

Sekcio 1: Dekano Wickström, Vicdekano Fößmeier.
Sekcio 3: Dekano Holdgrün, Vicdekano Minnaja.
Sekcio 4: Dekano Sellin, Vicdekano Strombach.
Sekcio 5: Dekano Quednau, Vicdekano Maitzen.
Sekcio 6: Dekano Tyblewski, Vicdekano Grego.

Elektoj de la dekano kaj vicdekano en la 2a sekcio ne okazis. La senato komisiis la rolon al la ĝisnuna dekano OProf. Pennacchietti.

5. El la ekzamenofico

Konstantaj membroj de la ekzamenofico en la unuopaj sekcioj por la deĵorperiodo 1996–1999 estu:

Sekcio 1: OProf. Fößmeier,
Sekcio 2: AProf. Dingeldein,
Sekcio 3: OProf. Minnaja,
Sekcio 4: OProf. Sellin,
Sekcio 5: OProf. Maitzen,
Sekcio 6: OProf. Tyblewski.

6. El la strukturofico

Dum tiu ĉi tagorda punkto ĉeestis ankaŭ Prof.[TS] Ŝilo, komisiita direktoro de la Teknika Sektoro, kaj ISKanino Tuhvatulina.

a) Prof.[TS] Ŝilo raportis detale pri la Eŭropa Jura Universitato (EJU) en Moskvo — inter alie pri ĝia strukturo, taskoj, ekzistantaj studadplanoj (pri la fakoj Jura Administrado kun 4jara programo kaj Manaĝerado kun 3jara studado), kaj ĝiaj jam nun ekzistantaj rilatoj al AIS — cele al sia petpropono, ke EJU fariĝu klerigejo de AIS. La prezidanto aprobis tiun proponon de Prof.[TS] Ŝilo, sed atentigis, ke povas ekesti malfacilaĵoj pro la interkonsentoj kun AsAIS en Rusujo. La senato aliflanke konvinkiĝis, ke AsAIS ne plenumis la faritajn promesojn kaj malaprobis la interkonsenton inter OProf. Kuznecov kaj la prezidanto en Brandys okazintan en 1992 konstatante, ke AsAIS ne donis iun ajn profiton al AIS. AIS tial ne plu subtenu la ideon, ke OProf. Kuznecov havu tie la ekskluzivan rajton. Komisiono konsistanta el kolegoj Quednau, Tyblewski, Wickström unuflanke kaj Prof.[TS] Ŝilo kaj ISKanino Tuhvatulina aliflanke prilaboris proponon al la senato pri kontrakto inter EJU kaj AIS. Tiun proponon pri estigado de klerigejaj rilatoj inter EJU kaj AIS la senato post klarigaj ŝanĝoj akceptis unuanime (nur jesaj voĉoj) en la formo, kiu troviĝas en la apendico „Interkonsento pri klerigejo de AIS".

La senato konstatis, ke necesas aldone atentigi pri la jenaj punktoj: De la studaddaŭro ĉe EJU oni devas dekalkuli unu aŭ du jarojn pro la mankanta maturecekzameno; oni atentu, ke AIS povas perdi pro la klerigejo studentojn, tial la enspezoj de la studentaj legitimiloj estu dividotaj jene: duonon ricevos AIS, duonon EJU.

b) Por klarigi la situacion en la rilatoj de AIS al Ruslando kaj Orienta Eŭropo la senato, informite pri multaj tekstoj el orienteŭropo precipe de OProf. Kuznecov, prezidanto de AsAIS, kaj de Prof.[TS] Ŝilo, estro de la orienteŭropa SubS-Sekcio (OES), decidis jene:

1. AsAIS estas la regiona asocio de AIS en Orienta Eŭropo konforme al la regularo de AIS; ĝi do estas kolektiva subtena membro de AIS apartenanta al la sekcio de la landaj kaj regionaj asocioj; ĝian voĉon havas ĝia estro aŭ ties anstataŭanto. La adreson fiksas kaj sciigas ĝia estro, do momente OProf. Kuznecov.

2. OES estas regiona sekcio de la subtena sektoro de AIS konforme al la regularo de AIS; ĝi do estas aro da subtenaj membroj, kies voĉon en la asembleo havas kaze de foresto de la unuopaj subtenaj membroj la sekciestro, do momente Prof.[TS] Ŝilo. La adreson fiksas li; momente temas pri la adreso de la Eŭropa Jura Universitato Justo, sub aŭ apud (ne: super) kies tabulo estu laŭeble fiksita ankaŭ tabulo „Orienteŭropa subtena sekcio de AIS".

3. Nek AsAIS nek OES apartenas al la Scienca Sektoro aŭ plenumas memstare taskojn de la Scienca Sektoro. Eventuale miskompreneblaj aŭ ne plu aktualaj klaŭzoj en pli fruaj protokoloj bezonus revizion surbaze de la intertempe akiritaj spertoj.

4. La interkonsentoj de AIS kun AsAIS en Brandys (1992-03-28/04-03) kaj San Marino (1993-09-05) montriĝis neplenumeblaj en pluraj punktoj (neokazigo de komunaj ankaŭ financaj aktivecoj, ĉiujara havigo de membrolisto de AsAIS, nekreado de kleriginstitucioj de AIS en orienteŭropo). Flanke de AIS ne estas videbla sukcesa evoluo en la daŭro de la kvar jaroj: el la agadtereno de AsAIS nek venis dume studentoj nek kandidatoj nek prelegantoj al SUS (nek kun, nek sen bonaj ILo-konoj), kaj AsAIS eĉ ne unu subtenan membron aŭ ISKanon trovis por AIS. La nova senato do ne vidas utilon daŭrigi sen aktualigoj la iamajn interkonsentojn. Precipe montriĝis malutila la intencita koncentriĝo de ĉiuj iniciatoj de AIS en orienteŭropo al kunaj agadoj kun AsAIS. La senato konstatas, ke ĝis nun ne ekzistas ajna orienteŭropa filio de AIS. Surbaze de la aktualigita regularo de AIS nek AsAIS nek OES povas sola plenumi ĉi tiun rolon.

5. La senato nuligas diversajn partojn de la interkonsentoj, kiujn provizore (t.e. cele postan pritrakton en la respondecaj decidorganoj) subskribis la prezidantoj de AsAIS kaj de AIS. Sed la senato ja aprobas la interkonsenton pri la presado de ISD 1996–1999 surbaze de presoriginaloj havigotaj de la redakcio. Nur ĉi tiu respondecas pri la enhavo kaj la tipografia formo. Pro tio ne estus konsilinde havigi anstataŭ presoriginaloj la enhavon surdiskede.

6. Sekve al la nuna situacio evoluinta el la kvarjaraj spertoj la Senato de AIS decidis mem ekaktiviĝi per unua provekzemplo sur la orienteŭropa tereno, tamen uzante la helpon de OES. La Senato tiucele agnoskis provizore por la venantaj 3 kalendaraj jaroj la jure memstaran, de AIS ekonomie ne dependan Eŭropan Juran Universitaton Justo kiel „klerigejon de AIS" kaj kontrakton pri ĉi tio konforme al la senatdecido de 1993-09-16/1693pfR.

7. Tiu ĉi rezigno pri la daŭrigo de ĝis nun senfrukta punkto de la interkonsento kompreneble ne ekskludas la akcepton de la propono de AsAIS, starigi en interkonsento kun AIS german-rusian klerigan centron agnoskotan laŭ simila interkonsento kiel „klerigejon de AIS". La membroj de la Scienca Konsilantaro de tiu ĉi centro devas esti almenaŭ subtenaj membroj de AIS, se ili ne jam plenumas la kondiĉojn por fariĝi ISKanoj.

c) Sekcio 2 konsideras kunigon de fakaroj 2.3 kaj 2.4 al kulturscienca fakaro pro manko de respondeculoj kaj pro sciencteoria konsidero. Anstataŭe oni

konsideras aldoni kiel ĝeneralan fakaron semiotikon kaj komisii ASci. Posner prof. dr. ĝin starigi. La senato akceptis tiun proponon.

d) Alvokoj akceptitaj unuanime de la senato:

Al sekcio 1: ADoc. Stojĉev kiel AProf.

Al sekcio 2: ADoc. Mag. sc. hum. Dingeldein kiel AProf.

Al sekcio 5: AProf. Novobilský kiel OProf., ADoc. Wandel kiel AProf., ISKano Rudnicki prof. dr. kiel AProf.

7. El la klerigofico

La senato emfazis, ke ankaŭ studentoj de neSUSecaj studadsesioj estas studentoj de AIS.

8. El la sciencofico

a) La inaŭguro de SUS 17 okazu en la universitato en Rimini nur lunde posttagmeze. Al la ministro en RSM oni sendu — same kiel al la oficialuloj en Sibiu, Nitra kaj Praha — invitojn al la solenaĵoj. La diplomojn akiritajn dum tiu SUS oni transdonu nepre vendrede en RSM, kaj ankaŭ la fermo okazu tie. Kolego Minnaja transprenis la taskon, mendi dignan salonon. La oficiala versio de tiu SUS estu: Dua itala studadsesio lige al SUS 17 en San Marino, okazonta de 1996-08-31 ĝis 1996-09-06. Dimanĉe antaŭ kaj laŭbezone sabate post la kursoj povas okazi senatkunsidoj.

b) Pri SUS 16 en Praha lige al la 81-a UK: Kolego OProf. Maitzen prezentu AIS-on ĉe la IKU-malfermo.

9. El la informofico

Estonte la direktoro de la informofico OProf. Fößmeier kontrolos subtenate de la dekanoj la enhavon kaj formon de la Acta Sanmarinensia. Kolego OProf. Tyblewski sendu la tiurilate jam kolektitajn artikolojn kaj alian publikigendan materialon al kolego Fößmeier.

10. El la honoradofico

Por la premio Pirlot 1996 ekzistis du proponoj, inter ili por la verko de ISKano Galajĉuk kand., kiu organizis medicinan sciencan kunvenon de la Universala Medicina E-Organizo („10-a Internacia Medicina E-Konferenco") kaj eldonis la koncernan programlibron kun sciencaj resumoj, de kiuj li mem verkis plurajn. Voĉdonado pri la demando, ĉu entute ĉi tiun jaron la senato aljuĝu la premion, donis jesan rezulton. Poste la senato per voĉdonado aljuĝis la premion Pirlot al ISKano Galajĉuk, kion komunikos al li la ĉeestanta Prof.[TS] Ŝilo.

11. El la identecofico

a) La temo de la aktuala akademia forumo estu: „En kio konsistas la identeco de AIS?". Gvidu je ĉi tiu fojo la forumon kolego Tyblewski.

b) Emblemoj de AIS: Laŭ la propono de la senato la emblemon kun la San Marinaj turoj uzu la Subtena Sektoro kaj ĝiaj dumvivaj membroj, sed NE la ordinaraj membroj de la Subtena Sektoro. Laŭ la propono de la prezidanto la rektlinian emblemon „AIS" uzu la oficoj kaj la unuopaj plenrajtaj membroj. Voĉdonado post forta diskuto, ĉu ĉiuj ISKanoj rajtas uzi sur leterpapero kaj vizitkartoj ĉi tiun emblemon donis la jenan rezulton: 5 jes, 3 ne, 1 sideteno. Laŭ tiu ĉi decido de la senato do ĉiuj ISKanoj rajtas uzi la emblemon „AIS". La senato aprobis, ke rilate al ĉi tiu lasta decido eniru la protokolon la jena skriba peto de la prezidanto: „Mi petas aldoni al la protokolita decido pri la uzadeblo de la AIS-simboloj, ke la direktoro de la identecofico anoncis meti en Praha la demandon denove sur la tagordon pro liaopinia nekohereco kun la decido pri la uzadeblo de la simbolo de SubS."

c) La identecofico kaj la informofico kune decidu, kiu presos la novan libroforman ISD.

12. Diversaĵoj

Pro la nuna interkonsento inter Pollando kaj Germanio, ekzistos supozeble ŝanco de agnosko fare de Germanio rilate al titoloj akiritaj en Pollando. Sed se oni nun provus atingi agnoskon, tiam oni riskus rifuzon. Rekomendindas tial provi tion nur post registriĝo de la titoloj en Pollando.

Protokolis: HS. Holdgrün
Vicdirektoro de la Protokolofico

Apendico al la protokolo de la 30-a senatkunsido:
Interkonsento pri klerigejo de AIS
Nitra, 1996-03-06

Dum la Nitra provSUS — en ĉeesto de profesoro G. Ŝilo, komisiita direktoro de la Teknika Sektoro de AIS, rektoro de la Eŭropa Jura Universitato JUSTO, kaj ASci. L. Tuhvatulina, estrino de la katedro pri internaciaj lingvoj en la sama universitato — la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, nomata plue „la Akademio", reprezentata de la Prezidanto OProf. H. Frank, aganta laŭ la Statuto de AIS, unuflanke, kaj la Eŭropa Jura Universitato JUSTO, nomata plue „la Universitato", reprezentata de la Rektoro prof. G. Ŝilo, aganta laŭ la Statuto de la Universitato, aliflanke, post detala pridiskuto en la Senato de AIS interkonsentis jene:

1. La AKADEMIO kiel scienc-kleriga libera organizo, neligita al iu ajn politika aŭ religia konvinko, specifa scienca skolo aŭ etnolingvo

1.1. agnoskas la Universitaton kiel klerigejon de AIS laŭ la art. 7.6 de la Regularo pri instruado kaj studado;

1.2. agnoskante la Universitaton libera nekomerca laŭ ĝia Statuto klerigejo, ne intervenas klerigprogramojn de la Universitato, zorgante nur pri plenumo de AIS-postuloj en ĝiaj programoj;

1.3. donas al la Universitato la licencon, kiu permesas okupiĝi pri universitatprepara kaj universitatnivela klerigado konforme al la valida Leĝo de Rusia Federacio „Pri Klerigado";

1.4. en konsento kaj kunlaboro kun la Universitato efektivigas internaciajn ekzamenojn kaj enmanigas al sukcese ekzamenitoj la diplomojn laŭ la koncernaj regularoj de AIS;

1.5. ricevas kotizon pro realigo de la ekzamenoj konforme al la Regularo pri la kotizoj kaj la mastrumado.

2. La UNIVERSITATO kiel neŝtata sendependa nekomerca altklerigejo de AIS, neligita al iu ajn politika aŭ religia konvinko, funkcianta konsente al AIS-Regularo, al la propra Statuto kaj al valida Leĝo de la Rusia Federacio pri klerigado

2.1. efektivigas klerigadon laŭ propraj klerigprogramoj, aldonante al ili kiel devigan studobjekton por ĉiuj studantoj la Internacian Lingvon Esperanto;

2.2. ricevas la licencon de la Akademio;

2.3. realigas internaciajn ekzamenojn por la studantoj;

2.4. garantias, ke ĝiaj studantoj akiros la studentan legitimilon de AIS post la sukcesa maturecekzameno;

2.5. post la sukcesa finstudado inkluzive skriban ekzamenon enmanigas al studentoj dokumentojn, kiujn la Akademio agnoskas kiel bazon por adapta adopto de bakalaŭreco. En la kapo de la dokumentoj indikatas kiel klerig-partneroj la Akademio, la Universitato kaj, eventuale, alia akademia strukturo, laŭ aldona interkonsento. La formo de la dokumentoj estu interkonsentota;

2.6. en la okazoj, kiam studantoj finas lernadon eksprese, rajtas ekzameni ilin memstare, tamen kun nepra partopreno en la ekzameno de efektiva membro de AIS kaj posta ekzameniĝo ĉe la Akademio.

3. La Akademio kaj la Universitato informas sin reciproke pri siaj aktualaj studadplanoj kaj aliaj regularoj.

4. La interkonsento validas dum 3 jaroj kaj aŭtomate plilongiĝas, se ĝi ne estos nuligita aŭ ŝanĝita laŭ deziro de la interkonsentantoj kun averto 1 jaron antaŭe.

G. Ŝilo — H. Frank
Rektoro de la Universitato — Prezidanto de la Akademio

Protokolo pri la 15-a kunsido de la Subtena Sektoro de AIS, la 26-an de julio 1996, en Kongrespalaco, Prago.

Oni konstatas, ke la kunsido estis kunvokita ĝustatempe kaj -forme, kaj ke ĉiuj ĉeestantoj havas voĉdonrajton. Gvidas la direktorino, s-ino Jutta Buß.

P. 1-2

Pro la neĉeesto de la antaŭa AIS-trezoristo kaj la nova trezoristo de la Subtena Sektoro ne eblas prezenti bilancon kaj finkalkulon por la jaro 1995 kaj senŝarĝigi por tiu jaro la trezoriston. Ambaŭ farendaĵoj estas prokrastendaj, kiel decidis la membraro per ĉiuj voĉoj.

P. 3

Prof. Dr. Wickström, deĵoranta trezoristo ekde la 1996-01-01, prezentas la budĝeton por 1966. La kunsido per ĉiuj voĉoj konsentas akcepti ĝin kun necesaj modifoj. Plue estas per ĉiuj voĉoj decidita, ke la Subtena Sektoro kontribuu 2500,- GM al la por personaj kostoj de la sekretariejo por la unua kvartalo de la jaro 1996.

P. 4

S-ino Buß sciigas pri la agado de la direktoraro en la unua duonjaro 1996. La raporto estas konsente akceptita.

P. 5

Per ĉiuj voĉoj oni decidas prokrasti la proponon de mastrumadplano 1997 por la novembra kunsido en Paderborn.

P. 6

Post propono de la vicdirektoro estas decidite per ĉiuj voĉoj krom du sindetenaj, ke revalide ekde 1996-01-01 estu librotenado de la Subtena Sektoro apartigita de tiu de AIS kaj ĝi ekzistu aparte kun propra konto.

P. 7-8

Subtena Sektoro kunpreparos kaj kungvidos la tradician Novembran Renkontiĝon en Paderborn. Deĵorantas la vicdirektoro. Dum la okazaĵo oni detale

pritraktu ankaŭ la temon de membrovarbado kaj decidu pri eventualaj farendaĵoj.

P. 9
Kontribuoj al tiu punkto nek alvenis, nek estas prezentataj, tial la estrino fermas la kunsidon.

Prago, 1996-07-26
protokolis: Siegfried Piotrowski, vicdirektoro

Protokolo de la 31-a (post la fondo, la 25-a post la oficialiĝo de AIS fare de la konsilio de la XII kaj la 34a post la fakta laboro) senatkunsido okazinta en Prago (CZ) dum SUS 17. La kunsido okazis je 1996-07-21, 11.00–13.00 h; 1996-07-23, 17.00–19.00 h; 1996-07-24, 17.00–18.45 h; 1996-07-26, 10.30–12.00 h; 1996-07-29, 15.10–16.00 h.

Ĉeestis la senatanoj Frank, Fößmeier, Holdgrün, Lewoc, Maitzen, Tyblewski, Wickström. Parte ĉeestis kiel gastoj s-ro Cibulevskij, OProf. Kuznecov, Adj. Medvedev, Prof.[TS] Ŝilo.

0. Formalaĵoj
La tagordo ne estis fiksita. De la protokolo de la 30-a senatkunsido en Nitra la senato akceptis parton 6 „El la strukturofico“.

1. Punktoj koncernantaj plurajn oficojn
a) Sekretario, trezoristo, prezidanto kaj vicprezidanto zorgu ĝis SUS 17 pri funkcianta proceduro pri la flegado de la AISanar-listo. En la libro de la AISanoj estu ĉiuj efektivaj membroj kaj ĉiuj aliaj dumvivaj anoj de la kvar sektoroj.
b) En 1997 la unuanura SUS okazu en Rimini/San Marino.
c) La direktoroj de la diversaj oficoj kompletigu laŭbezone ĝis SUS 17 la liston de la oficanoj.

2. Sciigoj kaj proponoj de la prezidanto
a) Se partopreno en senatkunsido ne eblas, la prezidanto petis informi lin pri tio kvar semajnojn antaŭe kaj samtempe zorgi, ke la ofico estu reprezentata de alia kompetentulo, laŭeble (vic)senatano.
b) Protokoloj de la sekcikunsidoj kopie iru estonte al la vicprezidanto kaj al la prezidanto, se enestas proponoj pri alvoko aŭ rangoplialtigo.

3. Sciigoj kaj proponoj de la vicprezidanto
a) La vicprezidanto kaj la trezoristo kune kun la dekanoj kontrolu ĝis SUS 17 la enhavon de la prov-ISD. La dekanoj atentigu pri gravaj membroj eksigendaj nur pro formalaĵoj. Cetere daŭre validas la koncerna senatdecido farita en Nitra.

b) OProf. Fößmeier proponis, ke la ISD-datenbanko estu en Munkeno. La paperformaj aktujoj restu ĉe la prezidanto en Paderborn.

4. El la financofico
La valoro de 1 AKU dum la SUS 16 estis detale fiksita: ĝi egalu al 2300 ĉeĥaj kronoj.

5. El la protokolofico
a) Dum la UK la sekretario akceptu enskribiĝojn al la kursoj de OProf. Selten kaj OProf. Bociort, al la SUS, kaj ofertu haveblaĵojn de AIS kaj AL. La sekretario akceptu — anstataŭante la trezoriston — la koncernajn kotizojn kaj aliajn enspezojn.
b) Kursoj dum SUS ne anoncitaj en la programkajero ne validas kiel SUS-kursoj, se la aldono ne estas protokolita en la senatprotokolo.
c) De la protokollibro kaj de la Senato kaj de la Ĝenerala Asembleo ekzistu du ekzempleroj, unu en la protokolofico, unu ĉe la prezidanto.
d) La senato akceptis la enplektiĝon de la latina simpozio en SUS 17 en Rimini/San Marino, kiu realiĝu en la dua sekcio (humanistiko). Al la latinistoj estu disponigota salono, se tio ne kaŭzos apartajn kostojn. La partoprenontoj regule aliĝu al SUS 17.

6. El la strukturofico
a) S-ro Cibulevskij el Ukraino sciigis pri grupo da sciencistoj en sia lando, kiuj ŝatus kunlabori kun AIS. La prezidanto informis pri la jenaj eblecoj: ili aliĝu al AIS aŭ ili fariĝu kolektiva subtena membro aŭ individuaj senperaj subtenaj membroj de AIS.
b) OProf. Kuznecov kaj Prof.[TS] Ŝilo prezentis siajn disajn opiniojn pri la nun ekzistantaj organizaj strukturoj sur la teritorio de la iama Soveta Unio.

7 El la identecofico
a) La senato ne vidis eblecon transpreni la kostojn por la gastigo de delegacio el Opole kaj petis la identecoficon ilin pagi kiel iniciato al la kunlaboro kun Opole.
b) La temo de la forumo dum ĉi tiu SUS estu „Aktualigo de la AIS-strukturo“. Gvidu la forumon OProf. Tyblewski. La skribe ellaboritan proponon de s-ro Buß prezentu dum la forumo OProf. Fößmeier.

8. Diversaĵoj
a) La senato proponis al UEA detalan interkonsenton pri la reciprokaj rajtoj de la partoprenantoj de SUS respektive UK, ĉeesti la programerojn de la alia organizaĵo, se SUS kaj UK okazadas en kunlaboro.

b) La Senato dankis al OProf. Lánský por la invito al Budejovice kaj kolektive ĝin akceptis.
c) Kiel vicsenatanojn la senato proponis al la Ĝenerala Asembleo elekti la profesorojn Lánský kaj Kiselman.
d) La Senato kun ĝojo eksciis de la rektoro de la universitato de Opole pri la intenco alvoki OProf. Tyblewski ekde 1996-10-01 al la universitato de Opole. La Senato anticipe gratulis kaj esprimis sian esperon, ke tio helpas al starigo de kunlaborkontrakto kun ĉi tiu universitato kaj al la refunkciigo de pola filio de AIS. La Senato kun kontento konstatis la ĉeeston de la delegacio el Opole dum ĉi tiu SUS.

Protokolis: Joanna Lewoc/H S. Holdgrün
Protokolofico

Protokolo de la 21a kunsido de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS, okazinta dum SUS 16 en Prago (CZ) marde, 30-an de julio 1996/1695pfR, 17.00-17.52h en la salono Schmidt.

1. Formalaĵoj
Neniu pridubis la kvorumecon aŭ ĝustatempan inviton al la kunsido. Kontraŭ la protokolo de la lasta kunsido de la Ĝenerala Asembleo en Nitra neniu protestis, ĝi do estas akceptita. La tagordo estis kompletigita jene: sub tagorda punkto 5 estu pritraktataj la jenaj aferoj:
- 5.1 Strukturo de la scienca sektoro
- 5.2 Latina Simpozio dum SUS 17
- 5.3 Kunigo de la unuaj libroj
- 5.4 Dumkongresaj studadsesioj
- 5.5 Elekto de revizoroj por la jaroj 1996–1999

Neniu protestis kontraŭ la tiel modifita tagordo.

2. Ĝenerala raporto de la Senato
La prezidanto rekomendis, ke la ĝenerala raporto de la Senato okazu dum la solena fermo.

3. Financa raporto, senŝarĝigo de la Senato 1991–1995, buĝeto
La bilanco por la jaro 1995 ankoraŭ ne ekzistas. Pro tio, ke ne ekzistas definitiva finkalkulo fare de la eksa trezoristo, la revizoroj ne povis kontroli la kalkulon kaj ili rifuzis akcepti ĝin kiel finkalkulon. Ne apartenas al la tasko de la nuna trezoristo prizorgi la finkalkuladon por la jaro 1995.
La de la Senato por la jaro 1996 proponita buĝeto estis akceptita. (Ĝi troviĝas en la apendico.) Buĝetpropono por 1997 ankoraŭ ne ekzistas.

4. Decidoj pri proponoj de la Senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn anticipe kaj legeblaj en la SUS-akceptejo almenaŭ 24 horojn anticipe
Neniu propono alvenis.

5. Kromaj tagordaj punktoj
5.1 Strukturo de la scienca sektoro
Ne okazis ŝanĝoj en la strukturo de la scienca sektoro.

5.2 Latina Simpozio dum SUS 17
La Ĝenerala Asembleo aprobis, ke kadre de la programo de la sekcio 2 dum SUS 17 en Rimini/San Marino okazu Latina Simpozio kaj ke dum la malferma solenaĵo okazu unu alparolo en la latina lingvo.

5.3 Kunigo de la unuaj libroj
Prokrastante la novan ISD-eldonon AIS aperigu en la unua kvartalo de 1997 kunigon de la tri AIS-libroj „Ekesto kaj celoj de AIS“, „Regularoj de AIS“ kaj „ISD“. La unua libro estu de la prezidanto dulingve verkita kun aldonoj de la aliaj oficialaj lingvoj de AIS, kaj enhavu aktualigon de la historia parto kaj klarigon de la senco kaj esenco de AIS.

5.4 Dumkongresaj studadsesioj
La Ĝenerala Asembleo proponis daŭrigi krom la studadsesioj polaj, germanaj, rumanaj, ĉeĥaj, slovakaj kaj italaj ankaŭ la „universalajn“ studadsesiojn kunlabore kun UEA, kondiĉe ke dum Universala Kongreso povos okazi almenaŭ tri kursoj, de kiuj la unua horo komencu per superrigarda prelego en la kongresa universitato, kondiĉe ke venos sufiĉe frue la informoj, kaj supozante ke UEA disponigos senpage la ejojn kaj ke partoprenos la studadsesion almenaŭ tri efektivaj aŭ adjunktaj AISanoj, inter kiuj estu almenaŭ unu efektiva membro.

5.5 Elekto de revizoroj por la jaroj 1996–1999
Kiel revizorojn por la jaroj 1996–1999 la Ĝenerala Asembleo elektis OProf. Weltner kaj PDoc. Fischer. (OProf. Weltner atentigis, ke li ne estos je dispono inter 1996-10-01 kaj 1997-03-15.) La ĝisnuna vicrevizoro Polerani estu petata resti.

6. Elekto de vicsenatanoj
La Ĝenerala Asembleo elektis la plenrajtajn membrojn OProf. Lánský kaj OProf. Kiselman kiel vicsenatanojn por la jaroj 1996–1999.

7. Diversaĵoj
Nenio sub tiu tagorda punkto.

Protokolis:
HS Holdgrün
Vicdirektoro de la Protokolofico

Apendico al la protokolo de la 21a kunsido de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro (SUS 16 en Prago):

Buĝeto de la Scienca Sektoro por la jaro 1996 (en germanaj markoj):

Elspezoj: pagotaj kostoj 6000; antaŭpagitaj kotizoj 1600; prezidanta ofico: komunikadkostoj 2000, preskostoj 1000, vojaĝkostoj 2000; financofico: komunikadkostoj 1000, helpanto 5000; protokolofico: komunikadkostoj 3500, preskostoj 600, amortizado 1000, buroa materialo 1000, kroma materialo 300. Sume: 25000.

Enspezoj: subtenaj kotizoj 2250; simbolaj kotizoj 2500; dumvivaj membroj 2500; SUS-enspezoj 1000; interezoj: deponoj 2550, ŝpardeponoj 750; debitoroj-1995j 2700; de subtena sektoro 4000; de fonduso pagotaj kostoj 6000; malgajno 750. Sume: 25000.

Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS San Marino okazinta en Rimini (I), lundon, la 2-an de septembro 1996/1695pfR, kadre de la 17-a Sanmarina Universitata Sesio lige al la 2-a itala studadsesio.

1. Formalaĵoj

La kunvoko okazis konforme al art. 9.3 de la regularo pri instruado. Malfermis kaj gvidis la kunsidon pro peto de la estraranoj Engel kaj Tuhvatulina OProf. Frank kiel prezidanto. ILo estis la ununura lingvo.

2. Pro foresto de la direktoro kaj de la vicdirektoro ĝenerala raporto ne okazis.

3. La kunvenintoj dankis al s-roj OProf. Minnaja kaj Pastro Magnani pro la bona aranĝo de SUS 17.

4. Plenumante funkciojn de la trezoristo OProf. Wickström, OProf. Frank poponis, ne ŝanĝi la AKU-kurzon, kiu egalis al 125,- DM. La propono estis unuanime akceptita. Oni ankaŭ decidis pro evito de bankaj elspezoj akcepti dum tiu ĉi jaro 130000 LIT kiel egalvaloron al 10 AKU (unuanime).

5. OProf. Minnaja transdonis proponon de s-ro Magnani, kunpartopreni akiron de hotelo en Rimini por studadsesiaj celoj. La proponon oni decidis transdoni al Akademidomaro.

6. Pro elspezoj neregulaj (ĝis 1000,- DM kadre de la buĝeto) decidu la estraro, aliaj elspezoj okazu nur pro akcepto de SubS-Asembleo.

7. Al SubS-anoj ne parolantaj ILe, loĝantaj en Italio kaj eks-Sovetio estu dissendataj nacilingvaj informoj pri agado de SubS kaj AIS 2-foje jare (propono de OProf. Minnaja).

8. La Asembleo kun 2 sindetenoj decidis pagi fakturon pri gaso, veninta antaŭ 2 jaroj (konsiderante, ke tribunalo povus agnoski AIS-on nepagikapabla kaj nuligi ĝian registradon).

9. Leteran proponon de OProf. Kuznecov, malfondi Orient-Eŭropan Sekcion de AIS, oni rifuzis kun 1 sindeteno.

Protokolinto: L. Tuhvatulina
Gvidinto: OProf. H. Frank

Protokolo de la 22a kunsido de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS, okazinta dum SUS 17 en San Marino Città (RSM) vendrede, 6-an de septembro 1996/1696pfR, 16.40-17.10 h en la salono Boulanger.

1. Formalaĵoj

Neniu pridubis la kvorumecon aŭ ĝustatempan inviton al la kunsido. La protokolo de la lasta Ĝenerala Asembleo en Prago estis laŭ la antaŭe afiŝita teksto akceptita. La tagordo estis fiksita laŭ la sekvonta skemo.

2. Enkonduko de Bakalaŭriga Universitata Sesio (BUS)

La Senato proponis al la Ĝenerala Asembleo por la nuna deĵorperiodo de la senato enkonduki bakalaŭrigan formon de neSUSeca studadsesio. Tiun proponon la Asembleo akceptis. Ĝi samtempe lasis al la Senato diskuti kaj fiksi la detalojn.

3. Strukturo de la Scienca Sektoro

Por ke ne estu ŝanĝita la strukturo de la Scienca Sektoro kaj samtempe kontentigita la bezono ene de la 5a sekcio pri diversaj fakoj la Ĝenerala Asembleo unuanime aprobis la enkondukon de Departamento pri Medicino kun la fakoj medicino, bestomedicino, farmacio kaj nutradscienco. La Departamento havu departamentestron kaj departamentvicestron.

4. Diversaĵoj

La ĜA aprobis la okazigon de la venontjara SUS, simile kiel tio okazis ĉi-jare, en Rimini/RSM kun la nomo: tria itala studadsesio lige al SUS 18 en Rimini/San Marino.

Protokolis: H. S. Holdgrün

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri presp retaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.